

Philippe Suchard (5) fondinto de ĉokolad-fabriko, la rakontisto

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-850/343, 1980 januaro 24 kaj 26
<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1980-52/SRI-1980-52-B-4-343-850-1980-01-24-26-Claude-kaj-Andree-Gacond-Philippe-Suchard-5-la-rakontisto.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ni konkludas hodiaŭ nian prelegaron pri Philippe Suchard, la fondinto de famiĝinta ĉokolad-fabriko, citante el lia verko "Un Voyage aux Etats-Unis d'Amérique, notes d'un touriste pendant l'été et l'automne de 1824" (Vojaĝo en Usono, notoj de turisto verkita dum la somero kaj aŭtuno 1824-a). Povu nia esperantigo sentigi la agrablan kaj observo-plenan rakontmanieron de Philippe Suchard.

A.- Ni elektis la 14-an ĉapitron, kiu raportas pri la gastigado fare de la urbo Nov-Jorko de indianaj ambasadoroj. Tiu teksto akiris historian valoron. Ĝi montras, kiaj estis en 1824 la rilatoj inter la blankuloj venintaj el Eŭropo kaj la indiĝenoj, kiuj ne povis kontraŭstari ilian dinamismon. Aŭdante tiun tekston, ni ne forgesu, ke ĝi estis verkita antaŭ pli ol cent kvindek jaroj. Ni citas:

Cl.- "Mi revenis en Nov-Jorko. Dum mia foresto estis alveninta en tiun urbon ambasado de ses indianaj triboj, kiuj loĝas proksime de la fontoj de la rivero Mississippi kaj ĉe la okcidenta marbordo de Ameriko. Ĝin konsistigis dudek-kvar tribestroj plus kvar virinoj kaj du infanetoj. Ili bezonis ses monatojn por nure alveni ĝis la kunfluejo de la riveroj Ohio kaj Mississippi. El tie oni perŝipe veturigis ilin almonten ĝis Pittsburgo. El Pittsburgo oni transportis ilin veturile ĝis Vaŝintono, kie la prezidento usona ilin akceptis per ĉiaj specoj de distingaj. Helpe de kvar interpretistoj, kiuj loĝadis ĉe ili, estis farita traktato alianca. Por doni al ili impreson troviĝi antaŭ pli progresinta civilizo, la prezidento promenis tiujn infanojn de la dezerto en la plej grandajn urbojn de la lando en kunesto de du membroj de la registaro. La indianoj alvenis en Nov-Jorko tra Baltimoro kaj Filadelfio.

A.- "Oni organizis por ili feston sur la promenejo bateria. Kompreneble oni regalis ilin per vino, brando kaj frandaĵoj. Lertega muzikistaro ne ĉesis ludi dum la tuta vespero. Post tio pireteknikaĵo konkludis la feston.

Cl.- "Mi renkontis tiujn indianojn en svarmo da rigardemuloj je la eniro de la bateria promenejo. Estis kiam aŭdiĝis la sonoj muzikaj. Tuj la ambasadoroj ekaŭdigis festan aŭ militan kanton per tioma viglo, ke ili preskaŭ perdis la spiron. Ĉiuj iliaj kriadoj komenciĝis kaj finiĝis per sono tradukebla per *hu* aŭ *kohu*; ĝi perfortadis la timpanojn de tiuj, kiuj troviĝis apude."

A.- "La kanto posedis en si mem specon de melodio. Je malsamaj intervaloj la kantantoj kunleviĝis, la manoj ĉe la buŝo. Iliaj hurloj havis ion timigan. Samtempe iliaj gestoj kaj tordiĝoj estis tiom minacaj kun la milithakilo en la pugno, ke kiu ajn vidis unuafoje tiujn ĝentilaĵojn, tiu estis preta je ĉiu momento vidi la teron kovritan de sango de murditoj.

Cl.- "Kontraŭ unu ŝelingon mi ricevis la permeson eniri la baterian promenejon. Tie estis starigita ronda tablo, kiun ĉirkaŭis seĝoj. Kvar aŭ kvin cent scivolemuloj formis cirklon ĉirkaŭe.

A.- "Tuj kiam la sovaĝuloj sidiĝis, ilia unua okupo estis estingi la lumojn. Oni petis ilin tion ne fari, kaj oni proponis al ili plenglasojn trinkotajn; poste oni prezentis pladon al la ambasadestro, por ke li servu sin. Li etendis sur la genuojn sian antaŭtukon, kiun li portis ĉirkaŭ la kokso, kaj en ĝin li verŝis la enhavon de la tuta plado kaj li ĝin redonis. Post tio oni evitis proponi al la aliaj plenpladojn, oni donis al ĉiu propran porcion. Tiuj gastoj, dum ili manĝis, atente aŭskultis la muzikaĵon. Kiam ĝi ĉesis kaj kiam la rigardantoj aplaŭdis manfrape, la indianoj, je la unua frapo, malkvietiĝis, ili rigardis sin reciproke kaj ekkaptis siajn milithakilojn. Sed tuj kiam la muziko rekomenciĝis, ĉia timo forsvenis, kaj kiam la muzikaĵo denove finiĝis, por pruvi sian kontentigon, ili aŭdigis teruran krion.

Cl.- "Fine oni eksplodigis piroteknikaĵon, kio ŝajnis kaŭzi al ili agrablan surprizon, kaj je la oka horo ili retiriĝis. Dum ilia retiriĝo mi staris tre proksime de tiuj ambasadoroj. Unu el tiuj filoj de la naturo, apud kiu mi ekmarŝis, ekzamenis min same scivoleme, kiel mi mem lin rigardadis. Mi proponis mian manon al li ridante, kaj li premis ĝin plenfore. Lia hararo simile al tiu de la plejmulto el liaj kunuloj, estis duonrazita, kaj la har-tufon ornamis plumoj el ciuj koloroj; aliaj viroj havis longajn harojn, kiuj falis ĝis la ŝultroj. Ili portis ringojn je la nazo, iliaj brakoj kaj brusto nudis, same kiel iliaj gamboj. Kelkaj portis bestofelon, kiu pendis el la ŝultroj.

A.- Ili estas viroj bele konstruitaj, vigle muskolitaj, altaj je proksimume ses piedoj; ilia haŭto malpurruĝa estis krome malpurigita pro la kutimo sin frotadi per grasaĵo kaj ruĝa tero. Kelkaj estis tatuitaj. Ilia marŝado estis tute aparta. Ĝi ŝajnis al mi rezulti de marŝmanieroj akiritaj sur la grundo de praarbaroj. Ili daŭre konservas la okulojn fiksitaĵojn al la tero, kaj iras tiel rigardante nek dekstren, nek maldekstren. La virinoj, pli etaj kaj envolvitaj en feloj, ŝajnis tre timemaj. En la domo, kiun ili ricevis, ili ne akceptis disiĝi kaj petis, ke ili povu tranokti ĉiuj kune.

Cl.- "Ili reveturis hejmen per vaporŝipoj, kiuj rekondukis ilin patrujen realsuprante la riveron Hudson kaj trairante la grandajn lagojn. Unu el iliaj estroj mortis en Albany, ili kuŝigis lian kadavron en lignan keston kun duoblaj vandoj kaj ili ĝin kunprenis kun si.

A.- "La usonaj gazetoj listigis la nomojn de tiuj senditoj kun la koncerna traduko: mi ĝin donas. Ili nomiĝis: Tute fîŝa, Vento, Aglo surnesta, Vulpe lerta, Nubleviĝo, Malhela okulo, ...

Cl.- "Malfeliĉe mi – skribas Philippe Suchard – mi daŭre devis memori, ke mi restadis usone nur vizitcele. Mi havis ankoraŭ tiom por vidi kaj mi travivis tiel agrablajn tagojn!..."

A.- Konklude al nia rakonto pri la vivo de Philippe Suchard, vi aŭdis raporton, kiun la fondinto de la ĉokoldd-fabriko faris pri travivaĵo okaze de sia vojaĝo en Usono.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond diras al vi: Ĝis reaŭdo!